

# bulgara esperantisto

*Postimpulso*  
nov 1/1942

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekom. de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II, 1938

Adreso: Car Kalojan 20 — Sofia

1-2

JARO XXIII

S O F I A

Januaro—Februaro 1942

ELEKTITAJ VERKOJ EL LA BULGARA PENTRARTO



Nikolaj Evrov

Heliotropoj



## LA LINIO „ESPERANTO“

La modernaj nacioj, instigataj de unu arda deziro defendi la teritoriojn de siaj landoj kaj la riĉaĵojn de siaj civitanoj kontraŭ la invadoj de la malamiko, konstruis miraklajn citadelojn kaj fortikaĵajn sistemojn, nomatajn „linioj“. Laŭ sia situo kaj destino, tiuj linioj memorigas pri la muroj kiuj ĉirkaŭrampis la Ĥinan imperion. Multaj el tiuj sistemoj baldaŭ akiris tutmondan famon kaj gloron pro la perfekteco de siaj teknikaj konstruaĵoj, pro la sekureco, donata al iliaj defendantoj kaj pro la komforto de iliaj galerioj: linio „Magainot“, linio „Siegfried“, linio „Mannerheim“, „Metaxas“ k. c. Ili estis la lasta krio de la milita tekniko. La eminentaj konstruantoj, inĝenieroj kaj strategiistoj — aŭtoroj de tiuj ĉi fortikaĵaj sistemoj — kredis en la nealmilitebla rezistopovo de siaj verkoj. La popoloj mem serĉis ŝirmon kaj sekuron malantaŭ siaj **linioj**, sujiĉe solidaj kaj taŭgaj por protekti la patrujon kontraŭ la atakoj de la malamiko.

Bedaŭrinde, la lasta milito ruinigis multajn revojn, kredojn kaj iluziojn — inter aliaj, la iluzion pri la netraborblo de la fortikaĵaj sistemoj. La milito donis al la homaro kruelan lecionon, pruvinte ankoraŭfoje, ke la volo de detruado ĉe la homa speco estas nelimitita. Tiu ĉi leciono, kiu kostas al la homaro milionojn da viktimoj, montris plej elokvente, ke la materiaj ŝirmiloj, eĉ la plej dikaj ferbetonaj konstruaĵoj, restas senpovaj kaj senefikaj kontraŭ invadoj de organizita detrua forto. La popoloj vidis preskaŭ ĉiujn liniojn de fortikaĵaj sistemoj disfali unuj post aliaj kaj konvinkiĝis, ke nenia defendilo materia kapablas rezisti kontraŭ la genio de la detruo. La proskimaj okazintaĵoj konfirmis la aserton de kelkaj modernaj strategiistoj, kiuj proklamis la principon, ke ne ekzistas en la mondo iu absolute sekura kaj nealmilitebla fortikaĵa linio.

Mi konas, tamen, nur unu linion, kies sistemo da fortikaĵoj ŝajnas neniam

traborbla. Ĝiaj remparoj kaj kartoĉnestoj estas masonitaj nek el ŝtalo, nek el ferbetono, sed el bonvolo, entuziasmo kaj idealismo. Ĝi protektas nek la riĉaĵojn de la posedantoj, nek la interesojn de la klasoj, nek la ambiciojn de la politikistoj, nek la trankvilecon de la plutokratoj. Ĝi ŝirmas la patrujon de la homaranoj, la spiritan kapitalon de la civilizo, la moralajn fortojn kaj la etikajn fundamentojn de la socio. Ĝia nomo estas: la linio Esperanto. En la konkordo de tiu ĉi fortikaĵa sistemo kreskas la plej altaj idealoj, la plej sanktaj esperoj de la homaro. Sub ĝian tegmenton kolektiĝados ĉiam pli kaj pli multe da bonintencaj pioniroj kaj batalantoj por la nova mondo. Ĝi donos ĉiam pli kaj pli sekuran moralan protekton al siaj defendantoj kaj grandan spiritan forton al ĉiuj honestaj kaj noblaj homaranoj, kiuj, indignitaj de la moderna „civilizita“ socio, retiriĝos, simile al mezepokaj ermitoj, el la pekplena kaj koruptita mondo en la sinon de la esperantista familio. Tie, for de la mondplago, ili trovos la internan pacon, kiu donos al ili la nevenkeblan spiritan forton por kontraŭstari la frapojn de la kataklismo. Efektive, neniu materia forto povas egali la forton de la kredo en unu idealo. En ĝi troviĝas la garantio de nia triumfo.

La linio Esperanto formas fermitan ĉenon. Ekstere la detruaj fortoj furiozas, fajro kaj ŝtalo ruinigas la kadukan „civilizacion“, morto kaj dezertigo etendas siajn funebrajn flugilegojn ĝis la fino de la mondo. Interne bolas vivo, ŝprucas ĝojo kaj entuziasmo, krakas laboro: **la novaj homoj konstruas la novan homaron**. En tiu ĉi zumanta abelujo la diligentaj homaranoj, arĥitektoj de pli bela mondo, masonas la fundamentojn de la estonta kultursocia ordo. Ekster la linio Esperanto ŝtormas la kataklismo. La tero fariĝas infero, kies hirtiĝiniaj loĝantoj, perdintaj sian internan pacon kaj animan ekvilibron, sin ekstermas reciproke. La sento de nese-



*kureco incitas ilin kaj stimulas ilian sangavidon kaj iliajn materiajn kaj teritoriajn apetitojn. Nenia nobla celo, nenia alta idea'o. En la ĥaoso de tiu ĉi interregno la rabo, la mortigo kaj la rajto de la plifortulo estas la solaj leĝoj. Interne de nia sistemo da fortikaĵoj regas paco, harmonio kaj konkordo. Tie ĉi la novaj homoj dismovigas siajn virgajn kreofortojn en senlaca laboro por realigo de sia plej nobla espero.*

*Neniu bombo, neniu grenado povas penetri en la linion Esperanto. Tiu ĉi morala fortikaĵo donas al la esperantista popolo, kiu kompaktiĝas sub ĝia tegmento, tian sekurecon, kian eĉ la plej dikaj ferbetonaj „linioj“ ne povas garanti al la ceteraj popoloj.*

*Ĉar neniu idea movado estas pli sekura ol tiu, kiun ŝirmas kaj aktivigas la espero.*

D-ro St. Ĝuĝev

## ELEKTITAJ PAĜOJ EL LA BULGARA LITERATURO

† NIKIFOR p. FILIPOV (Falco Peregrinus)

# PATRINO

(El la kolekto „Rakontoj de la ĉasisto“)

Post unu infana amuzaĵo, donita de la gelernantoj en vilaĝo je honoro de la patrinoj, kiun ĉeestis ankaŭ mi kun doktoro Miŝo, tiu ĉi rakontis al mi sufiĉe interesan historion, kiun mi transdonas laŭvorte.

Mi devas diri ĉi tie, ke la permeson de la doktoro mi ne havas. Mi ne scias, kie li depost kelkaj jaroj estas kaj petas lin pardoni mian karaĝon, se hazarde li ekscios, kaj se mi estas forgesinta ion.

— Tio okazis ne antaŭ longe — komencis li. Okazis la pasintan printempon. Kelkajn tagojn antaŭ Anunciacio, mia vojo kondukis min al S-mo. Mi kruĉiris laŭlonge kaj laŭlarĝe tiun vilaĝon kun grandiganta mizero en stratoj kaj domoj kaj kun plenaj drinkejoj. Fininte mian laboron malfrue posttagmeze, mi forlasis la vilaĝon kaj direktiĝis al la stacidomo, kie mi estus atendinta la Sofian vagonaron.

Ĝis la stacidomo, kiel vi scias, estas oko da kilometroj, kiuj por mia cirkelo ne prezentas ian malfacilaĵon. Post la militoj kun iliaj longaj marŝadoj kaj ankoraŭ pli longaj bivakadoj, por mi la spaco kaj tempo kvazaŭ perdis signifon.

Kvankam nun mi ne disponis multan tempon — ĝi estis severe kalkulita kaj mi rapidis ne maltrafi la vagonaron al Plovdiv — mi tamen fordonis min al mia ĉiama malforto. Mi ne povis kon-

traŭstari la tenton, halti tie-ĉi kaj tie sur la vojo, por rigardi la mirindan vastaĵon, kiu malkovriĝas ĉirkaŭe. Miaj okuloj rave glutis la belegan vidaĵon de la S-ma alta, facile ondiga plataĵo, klinita orienten kaj ŝirmata kiel ĉarma belulino en unu el la sinoj de la orienta Rila-montaro.

Mi estis surprizita, ke en najbareco kun la mallarĝa, kiel tunelo, ŝtonega kaj eterne polva B-vo (mi eĉ ne suspektis), troviĝas tia ne sufiĉe ĝuebla vastaĵo kun freŝa kaj diafana, kiel kristalo, aero, klaraj akvoj kaj tia lazura ĉielo. La suno brilis super la verdiganta en la frua printempo vasta plataĵo. La venteto alportis de la intermonto super la vilaĝo la freŝan odoron de pino kaj geranio, kaj la proksimaj montosuproj sternis la vesperajn ombrojn al la vilaĝo.

En la herbejoj kaj plugitaĵoj de la vasta plataĵo, tie-ĉi kaj tie estis videblaj ŝafaroj kaj brutaroj. Ŝafaro eliris el salikaro malrapide kaj paŝtigante supreniris la nudan plugitaĵon, trairis la malaltan monteton kaj perdiĝis.

La ŝoseo kondukis tra tiu salikaro.

Jam atinginte kaj enirinte ĝin, mi vidis blankan ŝafinon penetri tra la arbetaĵoj dekstre. Ĝi venis al la fositaĵo, haltis rekte kontraŭ mi kaj, rigardante min, eklekis.

Mi pripensis, ke ĝi perdis la vojon en



la salikaro, ne rimarkis kiam la ŝafaro eliris kaj nun ĝin serĉas.

Sed la blekado estis iel aparta. Ne tia de restinta, perdita aŭ enfermita ŝafino. Ĝi estis la konata al ĉiuj okupiĝantaj kun brutaro, brusta sono — mallaŭta, delikata, longa „mmm“, per kiu la ŝafino respondas al sia ido, karesas ĝin kaj invitas satsuĉi.

Ne atentante tion, kun ignoro, malvarme kaj indiferece mi daŭrigis marŝi, sed la ŝafino ne lasis min.

Ĝi ekiris paralele kun mi preter la fositaĵo, sin tenante je la salikaro, ne ĉesante min rigardi kaj bleki ĉiam tiel delikate, eĉ petegante.

Dio, kion tio ĉi signifas? Kion deziras ĉi tiu ŝafino?

Mi haltis.

Haltis ankaŭ la ŝafino kaj ni ekstaris unu kontraŭ la alia, okuloj en okulojn. Ĝi mm-adis.

Estis plu nenia dubo, ke ĉi tiu besto serĉas ion, volas anonci ion al mi, ion gravan, neordinaran, kion mi povis diveni. Ĝi estas forta kaj sana ŝafino kaj ĝi ne restus malantaŭe de la ŝafaro aŭ, tiuokaze, ĝi kurus tra la plugitaĵo kaj blekus laŭte; ne estus eĉ atentinta min.

Tiuj delikataj sonoj, kiujn ĝi direktas al mi per buŝo kaj peteganta rigardo, ne estas io alia ol kora peto pri la helpo.

Io okazis.

Mi saltis kun etendita mano por ĝin karesi. Ne forkurante, ĝi turnis sin kaj ekiris malrapide al la arbitaĵoj, retornante sin por vidi ĉu mi postsekvas ĝin.

En tiu ĉi momento mi jam komprenis, kia estas la afero.

La sango sur ĝiaj malantaŭaj kruroj montris, ke ĝi ĵus liberigis de la nask-suferoj kaj fariĝis patrino.

Mi plirapidigis mian marŝon. Farinte post la ŝafino dek aŭ dekkvin paŝojn, mi ekvidis sub arbitaĵo, sur la nuda herbo, etan kreitaĵon kun blanka frunteto, nigraj longaj oreletoj, kun larĝaj kafmakuloj sur la skapoloj, sur la kruretoj; kvazaŭ hirundeto. Ĝi penis staraĝi sur siaj antaŭaj kruretoj. Estas aŭdebla ankaŭ ĝia ankoraŭ malforta voĉeto.

La ŝafino ekrapidis mm-adante al ĝi. „Jen mi, jen, karuleto mia! Ne timetu, jen mi ĉe vi! Mi iris por venigi jen

tiun sinjoron“, ŝajne diris la patrino al sia kara ideto, ekstaris super ĝi, eklekis ĝin sur la koleto, sur la vosteto kaj murmuretis al ĝi siajn delikataĵojn.

Granda momento!

Mi deprenis la ĉapelon, krucigis la manojn kaj ekstaris kvazaŭ enfosita antaŭ la grandega bildo de la nova vivo. Kaj admiro kaj entuziasmo kaj respektego egale agitis mian animon pro tiu eta afero, kiun mi travivis depost kvin aŭ dek minutoj. La bildo mem parolis kaj mi komprenis tre multe.

— „Vi vidas, sinjoro, kia estas la afero, — parolis al mi la ŝafino sen vortoj. — Naskiĝis al mi ĵus antaŭ unu horo eta ideto, ankoraŭ malforteta. Vidu, ĝi ankoraŭ ne povas stariĝi sur siaj kruretoj. Mi estas tiel feliĉa, tre feliĉa! La unuan momenton, kiam mi vidis ĝin, mi forgesis ĉion ceteran pro ĝojo, mi forgesis eĉ, ke mi estas tute sola ĉi tie kaj ke estas tre danĝere kaj por mia etuleto kaj por mi. Tial mi venigis vin. Faru, kion vi povas por ni. Mi timas eĉ ekpensi, kiel ni renkontos la vesperon ĉi tie. Mi timas eĉ nun ankoraŭ dum la blanka tago... Aglo ĉirkaŭflugos super mia kapo kaj forportos mian ĝojon!...

Mi alpaŝis kaj kliniĝis, prenis la ŝafidon en miajn manojn, ĉirkaŭprenis ĝin kaj surŝutis per karesoj. Ĝia bunta kapeto kun belaj mildaj okuletoj estis nesprimeble bela. La koreto interne rapide kaj egalmezure pulsas. Jam de unu horo en la blanka mondo tiu ĉi eta koreto ekkantis sian kanton sub la suno: vi-von! vi-von! vi-von! Kaj la patrino rigardis tiujn karesojn al sia ido kaj esprimis sian kontenteton per delikata murmereto: „Ĝi ja estas bela, ĉu ne, sinjoro? Kaj tiel milda... Kion vi diros? Vi ne buĉos ĝin, jes?“

Vere, tre mildan kaj karan estaĵon mi tenis en miaj manoj.

Admirante ĝin, mi ne forgesis ankaŭ kion mi devis fari. La patrino, tremanta pro sia ido, staris antaŭ mi kaj atendis, fidis je mia gesto. Tio estis serioza momento, supera momento por ĝi. Ĝia deziro estas sankta kaj devas je ĉiu prezo esti plenumita. Patrino estas tio! Mi devis ekporti ĝian malfortan ideton en miaj



manoj kaj ekiri por serĉi la ŝafaron. Ke mi rapidis al la stacidomo; ke tie, en la atendejo, estas surmurigita horaro de la vagonaroj, kiu en la B. R. F.<sup>1)</sup> estas plenumata kun nepra precizeco — en la okazo por la patrino ne havis signifon. Tie ĉi, super ĉio, gravis la vivo de ĝia ideto.

Eble Dio mem min ekzamenas en tiu ĉi momento, — pripensis, mi.

Mi jam sciis la direkton de la ŝafaro kaj ekportis la ŝafidon, sekvata ĉe miaj kalkanoj de la ŝafino. Kaj en la mallonga distanco, ĝis ni surpaŝis la plugitaĵon, ĝi ofte viciĝis kun mi, rigardis la ŝafidon kaj aŭdigis sin al ĝi, por ke ĝi sciu, ke ĝi estas ĉi tie, por ke ĝi ne timu, ke la sinjoro, kiu ĝin portas, estas ĝentila noblulo, ke li ne buĉos ĝin ktp. ktp.; aŭ ĝi simple volis ĝin havi ĉiam antaŭ la okuloj, por ke ĝi iel ne elvaporigu el miaj manoj. Certe ĝi suferis tiaĵon.

Baldaŭ sur la altaĵo aperis la ŝafisto. Mi kriis al li veni kaj preni la ŝafinon, levante alten la ŝafidon por ĝin vidi. Kiam li signis al mi, ke li komprenis, mi lasis la etuleton sub la mammo de ĝia patrino. Kvankam balanciĝante, ĝi povis ekstarti sur siaj kruretoj kaj ekserĉi por suĉi.

Sur la tuta vojo al la stacidomo, tiu ĉi okazintaĵo ne eliris el mia kapo. Eĉ io plia: mi estis en plialtigita idilia humoro. Proksime de la rivero Marica, kie oni eliras sur la Samokov'an ŝoseon, mi renkontis du virinojn kun knabeto.

„Patrinoj“, mi flustris al mi, deprenis la ĉapelon kaj salutis ilin. Mi deprenis la ĉapelon antaŭ la granda kaj luma sento — la patrina amo, sen kiu la tero en unu momento malvarmiĝus kaj kovriĝus per mortvesto. Ĝi estas ĉiam la sama ankaŭ en la odoro de la floroj, ankaŭ en la karesoj de la kolomboj, ankaŭ en la puraj kisoj de la knabinoj. En ĝi kaj per ĝi manifestiĝas la potenca volo de la Eterna Kreinto.

La vagonaro malfruiĝis je dudek minutoj. Tiom, kiom ankaŭ mi dediĉis por servi la beston.

Kun permeso de l'aŭtoro, el la bulgara tradukis  
*Ivan H. Krestanov, L. K.*

**Noto pri la aŭtoro.** Nikifor p. Filipov estas konata bulgara verkisto de la maljuna generacio. Li naskiĝis la 14-an de marto 1867 en vilaĝo Jakoruda (Razlog). Popola instruisto en unuagrada lernejo dum longaj jaroj, li publikigis sian unuan rakonton en 1894 kaj tuj plaĉis al la legantaro kaj al la literatura kritiko. Poste aperis liaj libroj „*Impostisto venis*“, „*Jakoruda en sonĝo*“, „*Rakontoj de la ĉasisto*“, k. c. Li subskribis siajn verkojn per pseŭdonimo Falco Peregrinus. Nikifor p. Filipov estas talenta novelisto. Li mortis la 25-an de Februaro 1942, sepdekkvinjaraĝa. La traduko de lia rakonto „*Patrino*“ estis jam sub preso, kiam ni eksciis pri lia morto. Li ripozu en paco!

NIKOLAJ LILIEV

## MIN PREMAS...

Min premas edziĝaj la vortoj,  
Kun ringo l'edziĝa mi dronas.  
Sur stratoj dezertaj kaj mortaj  
Mensogoj eternaj resonas:

— Vi estu humila sklavino,  
Viktimo senvola, sincera,  
Kaj steloj ekbrilos finfine  
Sur via dezerto surtera!

— Vi estu fidela edzino  
Dum multe da sunoj kaj lunoj  
Kaj kapon ribelan subkulinu  
Al via destino sensuna!

— Vi estu ripozo, ĝojeco  
En liaj bezonoj ĉagrenaj;  
Per via sunbrila juneco  
Lin gvidu al landoj serenaj!

O! Vane min logas vi, voĉoj:  
La horo perfida jam venas,  
Kaj vanaj plu estos riproĉoj, —  
La ringo edziĝa min ĉenas.

<sup>1)</sup> Bulgaraj Regnaj Fervojoj, (Rim. de l'trad.)



ORIGINALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

## L U P O J

Ondas desur la deklivo trista kaj timiga kanto.  
Tie staras silueto ombra sur la neĝ'  
kaj rikane dentoriĉan buŝon al ĉiel' montrante  
hurlas, vokas kaj minacas en sovaĝa preĝ'.

Eksilentas la arbar' krepuska, hirtas spirdetene,  
la dezerton neĝan nun vualas la vesper',  
kaj el la profundoj kaŝaj de la mont' ekmuĝas trene  
voĉoj plenaj de malsat', volupto kaj koler'.

Kun rigardo sangoplena, nebulita pro angoro  
kaj dezir', atentas la reganto de l'arbar',  
kaj al ĝiaj akriĝintaj sensoj venas la odoro  
ekscitanta de la in' dum ama februar'.

La intestojn ĝiajn plie la malsat' kruele ŝiras,  
vibras tra la karno plie, ŝvelas ama senti',  
sed la am' pli forta estas ol malsat', kaj ĝin altiras  
post la ŝpurojn de la ino praeterna tent'.

Kun sek-gorĝa murmurego paŝas vice la virlupoj,  
silentante kuras sangavida amatin'  
per gracia mov' de l' kruroj antaŭ la hirtara trupo,  
kaj elektas la fortulon laŭ la kor-inklin'.

Li per dentoj akraj vunde la femuron ŝian frapas,  
lian kolon igas sanĝi kison en respond',  
kaj iliaj fortaj ungoj la glacian neĝon skrapas,  
kaj frenezaj ili dancas dancon de la am' en rond'.

Glaciĝas, en okulo de l' Venuso griza, larmo  
pro tenero sangavida kaj ŝiranta ĝu' . . .  
Kaj la longa hurlo de la diskurinta luposvarmo  
kreskas al korŝira veo, al tempesta bru'.

*Miti*


---

## Pri nia organo „Bulgara Esperantisto“

Depost kelkaj jaroj nia organo „B. E.“ apenaŭ eltenas. Aparte plej doloran krimon ĝi travivas en la komenco de ĉiu jaro, nome la unuajn monatojn. Dum tiaj kritikaj periodoj, se ne estas ofere-maj samideanoj, kiuj monhelpus la revuon per propraj rimedoj, estas dubo, ĉu ĝi povus ĝis nun vivi.

La lastan jaron, kiam la milito furiozas preskaŭ sur la tuta terglobo, la tutmonda

Esperanto-movado estas tre grave vuntita. Dum tiaj kataklismoj, eĉ plej-malgranda faraĵo por nia ŝatata lingvo estas grava kaj viviga fakto.

Nia organo dum la lasta jaro aperis jam kvin fojojn kaj per sia bela, serioza kaj kuraĝiga enhavo brilis kiel lumturo en malluma oceano kaj varmigis la korojn de niaj en-kaj eksterlandaj gesamideanoj. Ĉi-jara redakcia komitato meri-



tas laŭdon pro sia granda fervoro. Dezirinde estas, ke dum venonta jaro ĝi ankoraŭ pli-vigle kaj obstine daŭrigu la laboron kaj informu nin ĝustatempe pri ĉio interesa.

Por ke unu afero estu bone plenumita, necesas la fortoj de pli multaj homoj. Ne sufiĉas nur bondeziroj, sed aktiva partopreno, kompreneble, laŭ la eblecoj de ĉiu.

Nun ni estas antaŭ la nova jaro. Jenaj tri demandoj devas esti solvitaj, por certigi la regulan aperadon de nia gazeto: la unua kaj plej grava el ili tuŝas la financon, la dua — la kunlaboradon kaj la tria — la helpantojn ĉirkaŭ la redaktado, ekspedo de la gazeto k. t. p.

I. La financon ni povas plibonigi varbante pli multe da abonantoj. Nun ekzistas malbona praktiko. Estas multaj gesamideanoj, kiuj deziras ricevi la gazeton kaj tre volonte pagus la abonon, tamen por ili estas neoportune ekspedi nur nnu abonpagon. Krome, plej ofte, pro la ĉiutagaj zorgoj, ili tute forgesas pri tio.

Preskaŭ en ĉiuj urboj kaj kelkaj vilaĝoj ni havas societojn, kiuj povas sukcese organizi la varbadon de abonantoj. Tiamaniere ni plifaciligos la laboron de la redakcio kaj iomete plivigligos la societivan vivon, kiu lastatempe estas tre malvigla. Tiam ekzemplon donis pasintjare la societo „Kulturo“ (Plovdiv), kiu varbis 57 abonantojn, dume en 1940 j. estis nur 17 regulaj abonantoj el Plovdiv. La saman faras ĉiujare la societoj: „Radio“ (Pazarĝik) kaj „Albatro“ (Varna). La surpaj ekzemploj estas imitindaj. Tie, kie ne ekzistas societoj, apartaj aktivaj esperantistoj povus plenumi la saman taskon.

La rezulto nepre estos kontentiga por ni, kaj kuraĝiga por la redakcio.

II. Foliante malnovajn numerojn de la revuo, ni renkontas tie multajn nomojn de Esperanto-verkistoj kaj tradukistoj, kiuj fervore kunlaboris en la pasinteco. Ili estis tre agemaj esperantistoj kaj certe ree partoprenos la redakcian laboron, vidante la klopodojn kaj la entusiasmon de aliaj samideanoj. Ni ne forgesu inviti ilin! Principe, ĉiu samideano povas kaj devas esti kunlaboranto. La kolono „Nia vivo“ ne postulas de ni, ke ni nepre estu talentaj kaj famaj verkistoj. Ĉiu samideano povas doni al la redakcio esperantajn informojn pri sia urbo aŭ vilaĝo. Tiu kolono ja estas la spegulo de nia movado! Ankaŭ tio ĉi estas grava kaj utila kunlaborado.

III. La tria demando rilatas nur la esperantistojn el Sofia. La loka tiea societo devas komisi kelkajn el siaj pli agemaj anoj, por ke ili helpu teknike la redakcion kaj la administracion. Ĉar estas afero tre maifacila, se nur unu aŭ du personoj dissendas la gazeton al ĉiuj abonantoj. Ekzemple, la laboro povas esti dividita jene por la ekspedo: Unu samideano sorgu por Sofio, alia — por Plovdiv kaj Asenovgrad, tria — por Varna kaj Burgas, kvara por aliaj urboj kaj regionoj k. t. p. Tiel la laboro estos rapide kaj facile plenumata.

Do, senprokraste al laboro por realigo de la supre skizita plano!

Realigante ĝin, ni povas atendi, ke nia organo de dumonata eldonado, kiel ĝis nun, fariĝos ĉiumonata kaj kontentigos la bezonon de la momento, en kiu ni vivas.

*Iv. Batakiev,*  
Plovdiv.

## Praktika laboro necesa

Antaŭe estis diro kaj ideo,  
sed poste — ago.

La plej altiranta ideo perdiĝas en forgeso, se ĝi ne povas esti iel praktike alplikata en la vivon, se ĝin ne sekvas la ago. Nur la alpikeblaj kaj alplikataj ideoj donas sian sigelon al la vivo kaj postrestas longajn jarojn kaj centjarojn.

Tio koncernas ankaŭ la esperantan ideon. Kaj vere, ĝis nun aperis, multaj proponoj kiuj celis alpiki Esperanton. Ankaŭ ĉe ni, en la pasinteco, ni klopodis atingi certajn rezultojn tiudirekte.

En kelkaj vortoj mi deziras denove



levi tiun demandon kaj fari proponon. Ni ne nur propagandu la lingvon kaj ideon esperantajn, sed ni klopodu en korpigi ilin en praktikan faron, en ekonomian instituton, kiu postvivos nin kun siaj celoj, de nun fiksitaj.

Malmultaj estas ni laŭ nombro, limigitaj estas niaj eblecoj, niaj rimedoj, sekve la celoj ankaŭ. Do ni devas bone pripensi kion entrepreni. Unue, nin kontentigos modesta eldonejo, kiu prenos la tutan eldonan laboron de la movado. Poste, diversaj fakoj disvolviĝos. La vivo, la bezono kaj la organizkapablo de la membroj montros la taŭgan vojon sekvo-tan. Taŭgaj celoj povas esti: ŝparkaso, helpofondoj, bankaj transigaj operacioj k. a.

Sed ĉio ĉi bezonas organizaĵon kaj monon en formo de kapitalo. Certe, oni komencos per malmulto. Tiun monon ni devas kolekti inter ni, ĉar neniu ĝin don-jacus. Estas ja malfacilaj tempoj, kiujn ni travivas, sed kledeble troviĝos nombro da samideanoj, kiuj oferus po certan sumon kun la deziro krei ion utilan por Esperanto.

La jura formo de tiu organizaĵo? Plej taŭga kaj plej koresponda al la karaktero de nia movado estas la koopera formo.

Oni memoras, ke antaŭ dekkvino da jaroj ni havis esperantistan kooperan societon, fonditan de kelkaj sofiaj esperantistoj. Ĝi agis unu jaron kaj mortis post la forlaso de la skribanto. Kredeble, oni povus reekvivigi tiun kooperon, donante al ĝi ne nur novan nomon kaj novan statuton, sed ankaŭ novan impulson, kolektante sufiĉan, por novaj kondiĉoj, kapitalon.

Sufiĉa kapitalo — tio estas la plej grava elemento. Mi rekomendus al neniu komenci antaŭ ol havi tiun kapitalon. Kiom multe? — almenaŭ 50.000 lv. en la komenco. Tian sumon povus doni 100 anoj po 500 lv. Ĉu ni havas ilin? Se jes, bone. Se ne — ni eĉ ne pensu pri laboro praktika kaj restu kun la songoj pri bela estonteco.

Taŭga homo, kiu gvidos la laboron, estas same grava elemento de la prospero. Ĉu ni havas tian? Mi ne scias. Sed oni povas krei lin, se deziro kaj entuziasmo de samideanoj ne mankas.

La vorto estas eldirita — ni esperu, ke sekvos la ago. La esperantistoj pruvu, ke ili povas esti praktikuloj ankaŭ, kiam necesas.

*D. Simeonov*

## Dek konsiloj al niaj kunlaborantoj

1. Skribu legeble kaj nur sur la unuan flankon de la folio.

2. Esprimu viajn pensojn kiel eble plej koncize. El stila vidpunkto, ĉiu vorto, sen kiu la senco povas esprimiĝi, estas superflua. Fr. Nietzsche diras: „Mi estas fiero, ke mi povas esprimi per tri vortoj tion, kion aliaj esprimas per tri paĝoj kaj por kio aliaj bezonas tri volumojn“.

3. Ne forgesu, ke via teksto estas destinata al tutmonda, internacia legantaro. Do ne uzu esprimojn, vortojn kaj frazturnojn (manierojn) nekomprenablajn por malproksimaj popoloj. Kio ne estas klara, ne estas esperanta.

4. Nur la konkreta penso esprimiĝas per klara frazo: tasku pensi ĉiam per

konkretaj, „objektaj“ ideoj kaj per precizaj imagoj.

5. Restu obstine fidela al la „Fundamento“. La lingvo estas socia kontrakto kaj vi ne rajtas rompi tiun ĉi kontrakton unuflanke.

6. Relegu kaj rekopiu kelkajn fojojn vian manuskripton, antaŭ ol ĝin sendi por presigo. Se la granda verkisto Tolstoj rekopiis dek fojojn sian dikanon romanon „Milito kaj paco“, des pli singardemaj devas esti la komencantoj de la verkarto.

7. Lerne ne nur verki, sed ankaŭ bruligi viajn nesufiĉe bonajn verkojn.

8. Cedu la versfaradon al la bonaj poetoj kaj vi preferu la prozon.



9. Ĉiu verko en Esperanto havas sencon kaj ekzistrajton nur se ĝi kontribuas ian novan brikon utilan por la konstruado de la nova kulturo esperantista. La verkado estas nek plezurludo, nek rime-

do fariĝi eminenta; la verkado estas diservo. Ne eluzu do viajn spiritajn energiojn en vana skribado de senutilaj verkoj.

10. Ne ripetu tion, kion aliaj jam diris antaŭ vi.

L. Grin

## Bulgaraj novjaraj popolkutimoj

Unu el la tagoj de la jaro, ligitaj kun tre multaj kutimoj, ceremonioj kaj kredoj ĉe la bulgara popolo, estas ankaŭ la tago de la Novjaro. Depost 1916, post la oficiala enkonduko de la novstila kalendaro, ni havas certan duigon de tiuj kutimoj en kalendaro rilato, sed en multaj lokoj ili okazas jam en la antaŭvespero kaj en la tago de Sankta Bazilo (la sanktulo festata de la ortodoksa eklezio la 1-an de januaro laŭ malnova stilo).

Je Novjaro, festo gardanta en Bulgarujo ankoraŭ la nomon de la idolana diino, kiu prezidis tiun feston, kaj nomiĝis „*Surava*“, oni kutimas ĵeti trans la fenestron pecon de la kuko, kiun tranĉas la famiĉestro. Ĝin farante, li prononcas la jenan preĝon: «Dio mia kaj vi, Sankta Surava, benu nin kaj multobligu la spikojn en niaj grenkampoj, la brutojn en niaj brutaroj, la herbon kaj fojnon en niaj herbejoj kaj la mielon en niaj abelujoj». Post tio li disdonas al siaj famiĉianoj pecojn de tiu kuko, unue trempante ilin en mielon. Unu el tiuj ĉi pecoj devas esti ĵetita tra la fenestro dum oni prononcas la jenajn parolojn: «Surava, nova jaro kaj vi, Sankta Bazilo, gustumu iom de nia kuko».

En kelkaj vilaĝoj oni elmetas eksteren tutan anseron rostitan, kiu estas, tiel diri, destinata al la diino Surava kaj al Sankta Bazilo. Ne estas malfacile diveni, ke tiu ĉi stranga rito celas substreki la sanktecon de la gastameco oferata en tiu ĉi sankta tago al la malriĉuloj kaj senposeduloj, ĉar tio ĉi estas unu el la ĉefaj ideoj de tiuj festoj.

Mi povus longtempe daŭrigi la ĉerpardon en la trezorujo de la malnovaj tradicioj kaj ceremonioj, sed mi menciis ankoraŭ unu el la plej kuriozaj kaj karak-

terizaj ritoj laŭ folkloro vidpunkto, ĉar ĝi rememorigas la malnovajn kredojn de niaj hindo-germanaj praavoj.

Dum la ludoj kaj festoj, kiuj akompanas tiujn plezurojn, la junulinoj elektas unu inter si, kiu devas esti blonda — aŭ helkaŝtan-hara, bluokula kaj ne pli ol 16-jaraĝa. Ŝi estas nomata «la reĝino de la suno», kaj ŝiaj haroj devas flirti libere sur ŝiaj ŝultroj, rememorigante tiamaniere la sunradiojn. La vilaĝaj geknaboj ŝin ĉirkaŭas kaj metas kronon sur ŝian kapon, kovrante ŝin fine per floroj. Promenante, ŝi estas sekvata grandpompe de tiu tuta gejunularo; muzikantoj, ludantaj fluton kaj violonon ŝin antaŭiras. La junulinoj ŝin akompanas, kantante ĥore tre malnovajn ritkantojn.

La plej karakteriza kutimo ĉie en Bulgarujo estas

### la Suravakado,

kiu reprezentas la gratuladon de la nova jaro flanke de la junularo, prefere la knaboj. Ĝi estas prezentata ĉefe laŭ du formoj ĉe ni. La unua, la pli disvastigita, konfirmiĝanta jam ankaŭ en la moderna vivo de la urboj, estas la sekvanta: la knaboj kolektas en la arbaro kornusarbajn vergojn (se mankas tiaj, ili kolektas aliajn freŝajn branĉetojn). Tiuj ĉi vergoj estas ornamataj per diverskoloraj ondformaj paperetoj, rostitaj maizgrajnoj kaj kelkfoje ankaŭ per kringetoj kaj moneroj. Frumatene per la tiel ornamitaj vergoj, nomataj „*suravaĉki*“, ili frapetas ĉiun renkontiton, eldirante la benon:

«*Sŭrava, vésela godína,  
I do godína sas zdrave!*»  
(Surava, gaja jaro,  
Kaj ĝis venonta jaro kun sano).



Iafoje, tiu ĉi beno estas treege disvol-  
vita kaj enhavas multflankajn bondezirojn  
pri diversaj prosperoj en la ekonomia  
vivo.

Post tiu beno la familianoj dankas kaj  
donacas al la «suravakantoj» kringojn  
speciale preparitajn por ĉi tiu okazo, kaj  
tiuj ĉi eliras por viziti aliajn domojn.

Sur la stratoj tiuj suravakantoj ofte kaj  
gaje krias: „Su-u-u-rava! su-u-u-rava!“  
La vizitado de la suravakantoj ordinar-  
e finiĝas tagmeze. En iuj vilaĝoj surava-  
kantoj estas ankaŭ aĝaj junuloj, kaj eĉ  
ankaŭ edzigitaj viroj. En tiu ĉi okazo ni  
havas ion similan je la „*koledaroj*“ (Kris-  
naskaj kantantoj). Tiuj suravakantoj ofte  
estas grupigitaj en bandoj kun gvidan-  
to — „*trohober*“ (kolektanto de paneroj)  
k. a., kiel ĉe la „*koledaroj*“, kaj ofte an-  
kaŭ maskitaj kiel ili.

La dua formo distingiĝas de la unua,  
ĉar tie ĉi la suravakantoj, anstataŭ frapeli  
per „surava-vergo“, enportas en la do-  
mon pezan ŝtonon kaj diras: „Kiom pe-  
zas tiu ĉi ŝtono, tiom da peza oro kaj abun-  
da haveco eniru en la domon“.

La kutimo de „suravakado“, laŭvice  
kun la „*koledumado*“, la bruligado de  
fastotagaj fajroj, la „*Lazar-um-ado*“ (ko-  
leklado de ovo per dancantaj knabinoj),  
la Sankt-Georgaj luloj kaj aliaj dum la  
jaro estas unuj el la plej gajaj kaj plej  
oportunaj por konservi sin estonece: ili  
kreas tre multan reprezentecon kaj estas  
sufiĉe grupaj por esti veraj popolaj so-  
lenoj.

Karakteriza por Bazil-tago aŭ Novjaro  
estas

### la vespermanĝado.

Ankaŭ ĝi estas tiel riĉa je manĝaĵoj  
kaj ceremonioj kiel la Sankta Vespero.  
La diferenco estas nur en la prezento de  
malfastaj (grasaj) manĝaĵoj kaj ordinar-  
e de tiaj el porka kapo kaj porkaj kruroj.  
Ankaŭ tie ĉi signifan rolon ludas la rita  
pano aŭ kuko kaj la rita fajro en la formo  
de la sanktvespera ligno.

Ambaŭ tiuj momentoj de niaj novjaraj  
kutimoj havas aŭ pure aŭ prefere *bon-*

*deziran* karakteron. La volo, donita en  
la formo de konscia aŭ subkonscia de-  
ziro, estas esprimita tie ĉi, ne nur per  
vortoj, sed ankaŭ per ago: la riĉe orna-  
mita (per pano, maizo kaj mono) freŝa,  
burĝonanta vergo estas, sendube, figura  
esprimo de dezirata riĉaĵo — pano kaj  
mono — kaj de sano. Tiu ĉi riĉaĵo kaj  
sano per frapado estas transdonata al la  
homo, i. e. transdoniĝas la deziro pri ri-  
ĉaĵo kaj sano. Kaj tiu ĉi deziro estas for-  
tigata per la paroloj. La abundeco kaj  
diverseco de la manĝaĵoj en la vespero  
ankaŭ en iu senco estas materiala espri-  
mo de simila ideo. Sed ankoraŭ pli ka-  
rakteriza en la okazo estas

### la novjara kringo

aŭ la kuko, en kiun oni metas pecetojn  
de la ĉiuspecaj produktaĵoj aŭ instrumen-  
toj de la ekonomia vivo. Tiuj ĉi pecetoj,  
reprezentantoj de la diversaj mastrumaj  
fakoj, servas ankaŭ por diveni kian feli-  
ĉon al ĉiu alportos la jaro. Se iu trovas  
en sia kukpeco ligneron de la plugilo,  
en la terkulturo estos lia bonŝanco, se  
plumon — en la birdbredado, se palisare-  
ron — en la ŝafbredado ktp. Per tio in-  
dikaĝas ankaŭ la prognoza karaktero de  
la novjaraj kutimoj. Ĝuste tiu ĉi elemento  
ĵa, fortigita, en multaj okazoj estas es-  
primita ankaŭ memstare en multaj

### antaŭdiroj.

Preskaŭ ĉie oni sortodivenas pri la sano  
de la apartaj familianoj — ĉu per metado  
de kornusarbaĵ burĝonoj sur varmegajn  
karbojn, ĉu per metado de salo en bul-  
bajn ŝelojn, ĉu per ĵetado de hederaĵ fo-  
lio en akvon, ĉu per ovo kaj per multaj  
aliaj manieroj. Oni divenprovas pli speciale  
ankaŭ pri la feliĉo en la geedziĝo de la  
gejunuloj — per metado de panpeco sub  
la kusenon aŭ fine per la brua kaj gaja

### superkantado de fingroringoj

flanke de la junulinoj. Oni antaŭdiras an-  
koraŭ pri feliĉo, ankaŭ rilate al la sema-  
ĵoj. Interesaj estas en tiaj okazoj la ce-  
rimonioj ĉirkaŭ la paliso de la draŝejo,



ĉe kio oni invitas la estontecon alporti pli da greno al la semaĵoj. Interesaj estas ankaŭ la ĉieaj minacoj al la senfruktaj arboj por ke tiuj ĉi portu fruktojn.

Fine, por havi ideon pri la bulgara lingvo — patrino de ĉiuj slavaj lingvoj,

jen kiel oni gratulas aŭ bondeziras al si je novjaro:

„Ĉestita nova godina!“  
(Feliĉan novan jaron).

*Ivan H. Krestanov, L. K.*

## Esperanto tra la mondo

La disvastiĝinta lastatempe milito rompita ĉiujn ligojn kun eksterlando. Nun en nian patrolandon regule alvenas esperantaĵoj kaj esperanto-informoj nur el Hungarujo kaj Svedujo — du oazoj de nia homama rondo familia, — kaj, neregule, el la ceteraj partoj de Eŭropo.

La informoj, laŭ la ricevitaĵoj, estas kuraĝigaj. La verda samideanaro, spite al la milito, laboras ĉie senĉese kaj sinofere. Dum la unua mondmilito (1914—18) tio ne estis videbla.

**Hungarujo.** Laŭdinda kaj imitinda estas la laboro de la hungaraj esperantistoj. Tie la Esperanto-afere antaŭenmarŝas, malgraŭ ke oni fakte militas.

Regule eldonataj gazetoj estas: *Hungara Herald* — organo de la Hungara Esperanto-Federacio, kaj *Cirkulero* — sciigilo por anoj de la Hungara Katolika Esperanto-societo. Dum la jaro, krome, oni eldonis kelkajn originalajn kaj tradukitajn verkojn en Esperanto.

Pasintan jaron, dum la Foiro en Budapeŝto, la esperantistoj aranĝis belegan sukcesplenan Esperanto-ekspozicion. En Budapeŝto dum novembro estis bone vizitita ĝeneralkunveno de H. E. F., kiu prezidis la eksministro Benard. La 30-an de nov. okazis la jarkunveno de la H. Esperanto Pedagogia Asocio. Antaŭ la kunveno estis sankta meŝo. Laŭ la farita raporto, la ekzamena komitato de H. E. P. A. faris 80 ekzamenigojn: pri parolkapableco — 38; kursgvidan diplomon ricevis 42 personoj. La jarkunveno decidis, ke H. E. P. A. insiste laboru por fakultativa enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

La 17-an de novembro okazis bonega kulturvespero de H. E. S., en kiu partoprenis i. a. St. Szathmary, K. Szase kaj la eminenta originala esper.-poeto Julio Baghy. La 14-an de decembro okazis grava por la tutmonda esperantistaro festprezentado — Espe-

ranto-filmmatinee. Estis prezentita la unua vere esperanta filmo: „La kuracistoj de la bildoj“ kun konvenaj paroladoj de Z. Mihalik, J. Baghy k. a. La filmo atingis egan sukceson, ĉar la publiko konstatis, ke Esperanto estas perfekte taŭga por parolanta filmo. La sekvan tagon (15. XII.) H. E. S. aranĝis Zamenhofan feston kun konvenaj paroladoj kaj amuzadoj.

La katolikaj esperantistoj, organizitaj en Hungara Katolika Esp. societo, samtiel laboras ivgle. Ili organizas regulajn renkontiĝojn kaj monatajn sanktajn mesojn en Esperanto. H. K. E. S. partoprenas ĉiujn entreprenojn de H. E. F.

Radio-disaŭdigojn en Esperanto oni povas regule aŭdi dufoje en ĉiu semajno.

**Svedujo.** La verda samideanaro en tiu ĉi pacinsulo senĉese laboras por nia ideo. La Esperanto-kluboj en multaj urboj kaj lokoj regule kunvenas, organizas amuzfestojn kaj kursojn. En Svedujo regule aperantaj gazetoj estas: *Svenska Esperanto Tidningen* — La Espero — organo de la svedaj esperantistoj, kaj *Nia Parolilo* — eldonata de la esperantista klubo de A. B. F. La bonekonata s-ano T. Morariu — sindiko de Sveda Esperanto-Federacio — vizitas la lokajn klubojn, organizante paroladojn kaj kursojn. Viglaj esperantistaj kluboj estas en Kristanstad, Linköping, Uppsala, Malmö, Boraŝ k. a.

Kune kun la neŭtrala Esperantista movado montras bonan vivon ankaŭ la Kristana Esperantista Ligo kaj la Sveda Laborista Esperantista Asocio. La lasta havis bone vizitatan jarkunvenon je la 6—7 de septembro en Boraŝ. La plenumkomitato oni reelektis.

— La rimarkinda agado de la s-anoj en Hungarujo kaj Svedujo devas servi kiel modelo, laŭ kiu oni devas labori ankaŭ en aliaj landoj de Eŭropo, malgraŭ la malfacilaĵoj kaj la mi-



lito. Interese estas, ke ankaŭ en la okupitaj landoj la esperantistoj maldormas. Jen:

**Nederlando.** La esperantistoj montras ankaŭ organizan kaj publikan vivon. Antaŭ nelonge, la registaro publikigis liston de la insignoj, kiujn rajtas porti la ŝtatoficistoj dum siaj deĵoroj kaj dum ili estas en la uniformvestoj. Inter kelkaj „sendanĝeraj“ insignoj, la listeto enhavas ankaŭ „la verdan esperanto-stelon“. Ĉiu nederlanda ŝtatoficisto rajtas do porti nian insignon ĉiumomente.

**Anglujo.** La anglaj s-anoj ankaŭ bone laboras. Internacia Esp. Ligo daŭrigas sian laboron. Oni eldonis la Jarlibron de 1941. Dum la aŭtuno oni eldonos, kiel pasintjare, suplementon al la jarlibro.

**Francujo.** En la okupita parto de la lando nia movado vivetas. La Esperanto-eldonejo en Paris — Librairie Centrale Esperantiste — regule funkcias. Samideanoj el ambaŭ partoj de Francujo povas mendi librojn.

**Ameriko.** Laŭ la nesufiĉaj informoj, en ambaŭ partoj de Ameriko la movado prosperas. Pri ĝi ni povas informi nur per Svedujo.

**Italujo.** La movado nun ne viglas. En Romo estas du ŝtataj oficejoj, kiuj favoras al Esperanto. Estus dizirinde perletere skribi al ambaŭ por instigi ilin al disaŭdigo, per la radio, en Esperanto. La unua oficejo estas: EIAK — Esperanta voĉo — Via Montello 5, Roma. Ĝi eldonas radiofoniajn programojn. Kaj la dua: Radioturismo — Via Simon Boccanegra 8, Roma, disdonanta turismajn eldonaĵojn.

*Iv. D. Es.*

— **Historia Kalendaro de la hungaraj inventistoj**, redaktita en lingvo hungara kaj en Esperanto, ĵus aperis. Ĝi enhavas la eltrovaĵojn kaj bildojn de la plej famaj hungaraj inventistoj.

— **En Svedujo** la esperantistoj ekzameniĝas helpe de la Sveda Esperanto-Instituto. Oni faras elementan aŭ superan ekzamenon. Ĝis novembro 1941 ekzameniĝis ĉirkaŭ 3000 personoj. La 30-a de novembro estis fiksita kiel „ekzamena tago“.

† **Prof. Tacuiĉiro Sigemacu.** Pere de la Revuo Orienta ni ekscias la morton de nia eminenta japana samideano prof. Tacuiĉiro Sigemacu. Li naskiĝis la 25-an de marto 1868 en Sikoku. Fininte sian kurson ĉe Tokyo Imperia Universitato, li laboris dum 40 jaroj ĉe la rondoj de edukado kaj agrikulturo. Liaj kelkmil disĉiploj nun daŭrigas lian agadon tra tuta Japanujo.

Prof. Sigemacu fariĝis esperantisto dum sia junaĝo kaj sindoneme laboris por Esperanto dum 25 jaroj, prezidis esperantistajn societojn kaj progresigis nian movadon en Ragoŝima, gvidis kursojn kaj multaj esperantistoj estis senditaj en diversajn regionojn de Japanujo dank'al lia interveno. Lia edzino, s-ino Ione, liaj trifiloj kaj unu filino formis esperantistan familion. Tieaj samideanoj ĉiusemajne kunsidis en lia domo.

Li ripozu en paco!

## N I A V I V O

**Sadovo** (Asenovgradsko). Dank'al la agado de s-ano Krestanov en la ŝtata agrikultura mezlernejo, kie li instruas germanan, francan kaj rusan lingvojn, estas jam aro da 30 esperantistoj, kiuj regule kunvenas ĉiusemajne. Ili skribpetis la direktoron por fondi esperantistan grupeton „Amikeco“ kaj deziras korespondi kun en-kaj eksterlandaj gesamideanoj. Krome, estas ankoraŭ du malnovaj esperantistoj tie ĉi: s-ro Georgi Ĉalâkov, instruisto-agronomo, kaj s-ro Simeon Ivanĉev, sekretario-kasisto de la mezlernejo. En sia lasta lum-

bilda parolado pri Palestino kaj Egipto, s-ro Krestanov ne preterlasis mencii, ke ĉie plej multe lin servis kaj helpis esperantistoj, kiuj fidele deĵoris sur ĉiuj vojoj de liaj multaj vojaĝoj. Ni laboras kaj esperas!

**Sofia.** Nia movado lastatempe plivigliĝas. Estas multaj dezirantoj lerni Esperanton. La Esperanto-literaturo disvendiĝas sukcese. Dum la somertagoj oni organizis kelkajn promenaĵojn ekster la urbo. Nun jam okazas renkontiĝoj, kie pli ol 20–25 ges-



anoj entuziasmiĝintaj gaje interparolas, kantas, prelegas, dezirante denove starigi sur la unuan lokon la Esperanto-movadon en Sofia. La junaj sofiaj esperantistoj organizis volontulan laborservon por Esperanto. La 22-an de februaro ĉirkaŭ 12 gesamideanoj laboris tutan tagon por la ekspedo de „Bulgara Esperantisto“. La esperantista volontula laborservo devus esti plivastigita kaj organizita en la tuta lando.

**Plovdiv.** Malgraŭ ke multaj el niaj tre agemaj s-noj pro diversaj kaŭzoj ne estas en la urbo, la nobla kaj senbrua esperanta agado ne ĉesas. La kunligo neniam estis perdita inter la gesamideanoj. Ne estas atingita ankoraŭ pasintjara vigla vivo de nia societo, tamen la farita ĝis nun laboro, konsiderante la kondiĉojn, estas kontentiga.

De novjara propaganda folio „Esperanto“ ni disvastigis jam centkvindek ekzemplerojn kaj ankoraŭ disvastigas ĝin. La folio faris bonan propagandon por nia lingvo inter neesperantistoj. Multaj ekdeziris lerni la lingvon, aĉetis lernolibrojn kaj komencis. Ni helpas ilin.

Ni varbas ankaŭ abonantojn por la preparata albumo de bulgaraj esperantistoj el la granda unuigita Bulgarujo.

*I. B. Magdin*

**Kumanovo.** La intereso al nia lingvo pligrandiĝas. La esperantistoj en nia urbo estas multnombraj. La ricevita Esperanto-literaturo instigas kaj kuraĝigas nin. En butikoj kaj surstrate ofte aŭdiĝas Esperanto-interparoloj. Niaj s-anoj jam korespondas kun esperantistoj el malnova Bulgarujo kaj kun hungaraj s-anoj.

*Br. T-v.*

**Strumica.** En la pasinteco nia Esperanto-afero estis bona. La junularo interesiĝis pri la lingvo. Nun ni laboras por leĝigi nian societon. La ricevitaĵoj kaj esperantaĵoj estas entuziasme legataj kaj disvendataj. Iuj s-anoj korespondas kun esperantistoj el aliaj lokoj. Ni atendas ankoraŭ esperantaĵojn.

**Informojn** pri la esperantista vivo de via loko (urbo aŭ vilaĝo) bonvolu sendi al s-ro Iv. Esperov, str. Pirot, 48, Sofia.

## VOLONTULA LABORSERVO POR ESPERANTO



Grupo da esperantistoj el Sofia ekspedas la revuon.

**La prezo de Bulgara Esperantisto** estas pli altigita pro la pialtigo de la paper — kaj preselspezoj. Depost la 1. de januaro 1942, la jarabono de nia revuo estas 25 levoj. Niaj samideanoj estas petataj faciligi ĝian eldonadon, pagante tuj sian abonkotizon.

— **La redaktoro** de Hungara Heroldo sendis sinceran dankon al multaj fremdlandaj samideanoj pro la helpo, kiun ili faris al la hungarlanda Esperanto-movado. Inter ili estas menĉiita ankaŭ nia samlandano Iv. K. Vasilev el Pazardĝik. S-ano Vasilev ricevis specialan danketeron, subskribitan de la prezidanto de la H. E. F. S-ro E. Brener kaj de S-ro J. Mihalik, redaktoro de la revuo Hungara Heroldo.

— **Bulgaraj samideanoj**, kiuj deziras korespondi kun francaj esperantistoj, sin adresu al s-ano: André Vedrine, instruisto, rue Ruplinger, Lyon 4, France.

— En la Sveda „Parolilo“, sub titolo: „Viaj linioj kuraĝigis min“ estas publikigita parto el letero de unu bulgara esperantisto.

— **En Svenska Esperanto-Tidningen** — **La Espero** № 8-9, troviĝas reklamoj pri la eldonaĵoj: Esperanto-Albumo kaj Adresaro de D. Ivanov—Ruse kaj „Baj Ganju“ de Aleko Konstantinov, tradukita de C. Todorov kaj P. Laĵovski.



BIBLIOGRAFIO

## KIAM LA HOMO NE ESTIS

(Romano)

La aŭtoro de la romano estas bulgara gimnazia instruisto-pedagogo. Lia verko estas unua en nia bulgara literaturo. Neniu bulgara verkisto ĝis nun traktis en ia verko la demandon pri la vivo de prahistoriaj estaĵoj. Pri la verko aperis kelkaj kritikaj notoj, kiuj trovas, ke la romano je scienca vidpunkto estas originala kaj apenaŭ sola en nia scienca belarta literaturo. En sia kritiknoto en gazeto „Zora“ s-ro J. Badev skribas, ke tiu verko troviĝas inter scienco kaj belarto.

*Kiam la homo ne estis* estas biologia romano. Ĝiaj ĉefpersonoj estas bestoj, al kiuj la aŭtoro donis interesajn kaj originalajn nomojn: Poma, Ĉung, Grau, Ho-Ho kaj ceteraj. La romanago okazas en prahistoria tempo. Antaŭ ni alterne aperas en unu alloga formo la bataloj por vivekzistado de tiuj bestoj inter si mem kaj ankaŭ kun la naturaj malhelpaĵoj. Ni vidas kiel malrapide, sub la influo de la ĉirkaŭaj kondiĉoj kaj de la instinkto por memkonserviĝo, kreiĝas certe pli bonaj vivkondiĉoj por tiuj bestoj kaj kiel el la prahistoria besto aperas la unua homo kun pli bonaj iloj por ekzistado, kun unuaj agoj de konscienco kaj de sociaj kvalitoj. La apero de unua societo, neceso de komuna vivo, kunligo de komunaj fortoj por komuna sukceso, kun ĉiuj postuloj de tiu sukceso kaj de tiu

vivo, la naturaj elementoj, kiuj ĉirkaŭas la bestojn — ĉio estas priskribita majstre.

La lingvo de la aŭtoro estas belega, alloga. Prave skribas Iv. Ivanov en revuo „Natura kaj scienco“, ke en la verko estas tiom da belarta realismo, kiom da forta scienca elemento. Kun egala rajto, eble, ĝi povas esti nomata romanigita naturscienco kaj naturscienca romano. La arto kaj la scienco en ĝi estas tiel bone kunligitaj, kiel en plej majstre skribitaj historiaj romanoj kaj romanigitaj biografioj. La herooj de la romano: Poma, la maljuna Ĉung kaj la juna Ĉung — estas priskribitaj vere kaj profunde psikologie. Kurage ni povas deklari: malofte en nia scienca literaturo estas donata tiel profunde la bildo de simio, kiu estiĝas homo. La klarvida informiteco de la aŭtoro rilate al la psikologiaj, naturfilozofiaj kaj ĝeneralfilozofiaj problemoj permesis al li kun neegalebla klareco observi kaj priskribi la transiron inter besto kaj homo kiel el antropologia, tiel same el psikologia vidpunkto.

Ni rekomendas varme al ĉiuj bulgarlingvaj amikoj la verkon de s-ro Dim. Angelov, nia malnova samideano. Ni atendas, ke li donos al ni novajn, ankoraŭ pli belajn kaj interesajn verkojn ne nur el la prahistoria tempo, sed ankaŭ el nia vivplena nuntempo.

Iv. Sarafov

## Novaj Esperanto-eldonaĵoj

La malfavoraj kondiĉoj ne malhelpas la pliriĉigon de nia literaturo.

**Sub la ombro de la piramidoj** — vojaĝpriskriboj el proksima Oriento — de nia s-ano Iv. Iliev. Bone ilustrita, kun antaŭparolo de G. Karaslavov, sub la redakcio de Iv. Esperov. Bulgarlingve.

**Albumo-adresaro** de la bulgaraj esperantistoj. Eldonas s-ano Dim. Ivanov el Ruse.

**Printempa Esperanto-folio.** La entu-

ziasma disvendo kaj akcepto de Esperanto — novjara folio inter la bulgaraj samideanoj, kaj la deziro esprimita de multaj esperantistoj kuraĝigis ties redaktorojn Iv. Esperov, V. Oljanov—Zefiro kaj K. Bojukliev. Tial ili preparas por eldono Printempan Esperanto—folion bulgarlingvan. Sendu artikolojn tuj al redaktoroj, str. Piroto 48, Sofia.

Ĉiuj esperantistoj devas kunlabori al tiuj priesperantaj eldonoj kaj subteni ilin.



## Esperanto-periodaĵoj ricevitaj

**Cirkulero-sciigilo** por anoj de la Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo. Numero de decembro 1941. Enhavo: Postkursa devo de la instruanto — de Fr. Engelmann; Donaco de la riĉa grafo (rakonto); informoj, libroj k. a. Adreso: Budapest V. Géza str. 4. Hungarujo.

**Nia parolilo** — loka Esperanto-gazeto, eldono de la esperantista klubo de A. B. F. (Svedujo) № 1, januaro 1942. XII jaro. Enhavas artikolojn pri Esperanto-movado en Hispanujo, en Svedujo, versaĵojn, leterojn de esperantistoj el Polujo, Usono, Norvegujo kaj Bulgarujo, informojn pri la Esperanto-movado en Svedujo, krucvortenigmojn. Adreso: E. Ekström, Linnégatan 38, Göteborg, Svedujo.

**Svenska Esperanto-Tidningen — La Espero.** XXX jaro, № 2, februaro 1942. Enhavas rakontojn, svedan Esperanto-kronikon, bibliografion k. c. La adreso de La Espero estas: Box 698, Stockholm 1, Svedujo.

**E. J. A. R. — Romo.** Radio-programo de ĉiuj Italaj radio-stacioj, inkluzive la Esperanto-disaŭdigojn. Februaro, 1942 — XX. Kune kun la programo, Esperanto-voĉo sendas ankaŭ bulgarlingve presitan libreton.

**Врачанско слово** — ĵurnalo ĉiutaga — Vraca n-ro 283. Enhavas i. a. reportaĵon de s-ano Murgin Canko: „Kristnaskaj kantistoj“. La esperantistoj en vilaĝo Galiĉe, Orehovo, kiel kristnaskaj kantistoj, kolektis 1,242 levojn por fondi Esperanto-bibliotekon.

**Frateco** — monata Esperanta-gazeto por frata vivo. Jaro VIII, 1942, februaro, n-ro 3—4. Enhavas: artikolojn por interfratiĝo; nova nutrado; paraboloj kaj fabeloj, mallongaj bulgaraj popolfabeloj; lingvaj demandoj; la unua parolado de D-ro Zamenhof; enlanda kaj eksterlanda Esperanto-kroniko; bibliografio, adresaro k. c. Adreso: At. Nikolov — Sevlievo, Bulgarujo.

# ПОЗИВЪ

## къмъ българскитѣ есперантисти

### Karaj samideanoj!

Кризата, която днесъ човѣчеството изживѣва, се отрази и върху есперантското движение. Въ нѣкои страни, особено въ ония, кждето то бѣше най-мощно, дейността на есперантиститѣ е намалена или спрѣна. Но въ повечето страни то живѣе, ако не и както преди. Отъ европейскитѣ държави най-силно е днесъ есперантското движение въ Швеция и Унгария. И България заема едно отъ първитѣ мѣста. Съ чувство на задоволство поради изпълнения дългъ българскитѣ есперантисти завършватъ съ успѣхъ старата 1941 година.

На много мѣста есперантскитѣ два и групи проявиха похвална дейность: устройваха редовни събрания и седмични срещи, забави, излети, откриваха курсове. Презъ изтеклата година бѣ издадена значителна есперантска учебна и пропагандна книжнина.

Органътъ на Българския есперантски съюзъ, *Bulgara Esperantisto*, продължава да излиза редовно, ако и въ двойни броеве. Той вече встъпва въ новата си XX. годишнина.

### [Karaj samideanoj!]

Нашъ дългъ е и презъ тая тежка година все тѣй да продължимъ нашата народополезна организационна и културна дейность, като се съобразяваме съ условията на изключителнитѣ времена, въ които живѣемъ. И тая година нашата дейность трѣбва да се изрази въ скромни прояви: срещи, излети, курсове (съ лекторъ, или взаимно-обучителни), кореспонденция (особено вжтрешна) и др. п.

Трѣбва да подкрепимъ и съюзния органъ, така необходимъ въ днешнитѣ дни на изпитание. Хиляди български есперантисти черпятъ отъ него духовна храна и нравствена подкрепа. Необхо-



димо е редовно сътрудничество въ списанието съ дописки, статии, снимки, оригинални и преводни трудове отъ страна на по-голѣмъ брой есперантисти. А най-важно — необходими сж срѣдства за издаването на съюзния органъ. Животътъ посжжпна нѣколкократно, цената на хартията и печата сжщо се увеличиха и затова се наложи абонаментътъ да се увеличи **отъ 20 на 25 лв.**

Налага се всички дружества, групи и отдѣлни есперантисти отъ всички краища на страната да почнатъ веднага

събиране на членски вноски и абонаменти за списанието. Желателно е по-заможнитѣ есперантисти да закупятъ по нѣколко абонамента за раздаване на читалища, библиотеки или на бедни членове.

### Samideanoj!

На работа и презъ тази тежка година! Да останемъ бодри по мѣстата си, работещи все по-жарко за дѣлото на културата!

*Bulgara Esperantisto*

### SAMIDEANOJ!

„Bulgara Esperantisto“ estas via organo, via revuo. Helpu ĝin morale, kunlaborante al la redakcio, kaj materiale — kolektante kiel eble plej multe da abonantoj.

## A T E N T U !

Por akceli la eldonon de mia presopreta multilustrita verko „Tra Eŭropo per Esperanto“, mi proponas grandrabate miajn „Esperanto-bulgara kaj bulgара-esperanta Vortaro“ (320 paĝoj) kaj „Bulgara Antologio“ (250 paĝoj). Bonvolu tuj sendi nur 110 levojn per poŝtmandato, neuzitaj poŝtmarkoj aŭ poŝtĉekkonto № 4591 kaj vi ricevovs ilin rekomendite.

IVAN H. KRESTANOV, publicisto,  
str. 6 Septemvri, Sofia.

## ПЪЛЕНЪ БЪЛГАРО-ЕСПЕРАНТСКИ РЕЧНИКЪ

30,000 думи подъ редакцията на Дим. Ивановъ се поставя подъ печатъ. Открива се подписка. Който предплати речника до 31 мартъ т. г., ще струва 20 лв, следъ тая дата — 50 лв. При 10 записани абонати — 1 екземпляръ **безплатно**. Суми се превеждатъ по пощ. чекова с/ка 3810 или въ марки на **ДИМИТЪРЪ ИВАНОВЪ, Русе, Н. Рилски 70.**

## АЛБУМЪ-АДРЕСНИКЪ

на есперантиститѣ отъ България и др. страни е поставенъ подъ печатъ. Наскоро ще излѣзе отъ печатъ. Издатель **Д. ИВАНОВЪ, Русе, Н. Рилски 70.**

Адресътъ на списанието е:

„Bulgara Esperantisto“, ул. Царъ Калоянъ 20, София.